

Brazilei

jaro 2 n-ro 8 2008

Ĉu Esperanto evoluas sane?

Neobojmo




Parolo
de spertulo:
Marco Antônio

Ĉio en la mondo evoluas.

Ankaŭ viaj lernantoj bezonas
plibonigi sian lingvonivelon...

Konduku ilin en progresigan kaj
perfektigan vojaĝon tra Esperantolando!





Enhavo

	Parolo de spertulo	
	Marco Antônio Ferreira Teixeira	06
	Omaĝo	
	Machado de Assis	24
	Ĉu Esperanto evoluas sane?	12
	Esperanto en plia enlanda universitato	20
	Lerninda letereto	23
	Kleriga flanko de Esperanto-lernado	26
	Konkurso: kristnasko per bildo kaj poezio	32
	Lernekskurso al muzeo	33
	Dumonata enkonduka kurso aŭ unujara baza kurso?	35
	Traduko-defio	38
	Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo	46
	Enkonduko	05
	Notinde	19
	Pliriĉigu vian vortprovizon	21
	Lude kaj lerne	37

Ilustraĵo de la kovrilo: Eder Benedetti
"Sylla Chaves forpelas neologismojn"

ilei

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Faka asocio pri instruado aliĝinta al
Universala Esperanto-Asocio (UEA)
www.ilei.info

ilei BR
www.ileibr.org

Provizora Sekciestro: Joseo Tenorjo

Sekretariino: Conceição Rodrigues

Kasisto: Joel Afonso Francisco

Brazila Sekcio de ILEI funkcias
ĉefe per interreto ĉe la adreso

www.ileibr.org

geinstruistoj@ileibr.org

biblioteko@ileibr.org

butiko@ileibr.org

Poŝtadreso por korespondado

Rua Francisco Garcia, 168 - Itaquera
08230-560 São Paulo, SP - Brazilo
Telefono: (11) 2055-7978

Brazilei

aperas kvarfoje jare kaj estas eldonata
de Brazila Sekcio de ILEI

ĉefredaktanto: Joseo Tenorjo

grafikaranĝo: Joseo Tenorjo

kontakto: revuo@ileibr.org

kontrollegantoj: José Dias Pinto,
Eurico A. Ribeiro, Conceição Rodrigues.

Kunlaboris en tiu ĉi numero: Marco
Antônio Ferreira Teixeira, Paulo Sérgio Viana,
Sylla Chaves, Geraldo Mattos, Emerson
Werneck, Alexandre Prado kaj
Luiz Alberto de Oliveira.

Eldiroj

“Mi mem ne aliĝis al UEA
por ricevi “servojn”, nek
por legi la revuon aŭ ricevi
jarlibron, sed ĉar mi kredas,
ke UEA plej bone povas
reprezenti la Esperanto-komunumon
eksteren.



Prof. Humphrey Tonkin, festparole
ĉe la solena malfermo de la 93-a
UK okazinta en Roterdamo.

“Kongrue kun la senĉesaj
klopodoj faritaj de ĉiuj
esperantistoj en la mondo
tra la lastaj jardekoj, la
93-a Universala Kongreso
de Esperanto reprezentas unikan
kontribuon al la afero de lingva
diverseco.”



Koïchiro Matsuura, Ĝenerala Direktoro
de Unesko mesaĝe al la 93-a UK.

“En niaj studprogramoj ni
koncentriĝu ne sole sur la
instruado de Esperanto.
(...) Ni instruu pri nia pli-
ol-100-jara movado kaj nia
100-jariĝinta asocio. Ni instruu ankaŭ
pri la E-komunumo kaj ĝia kulturo.”



Barbara Pietrzak, UEA-estrarano
pri informado raporte en la revuo
Esperanto 1217/2008 p.186.

Karaj Geinstruistoj



Jen plia n-ro de la revueto.

Ni dankas ĉiujn kuraĝigajn vortojn, kiuj dum unu eldono kaj alia atingas nin. Tiaj vortoj ja instigas nin maldormi kelkajn noktojn cele liveri al instruamantoj publikigaĵon praktikan kaj, laŭ kelkaj, kolektindan.

Al tiuj kolektemaj legantoj ni sciigas, kun bedaŭro, ke antaŭaj presitaj n-roj de Brazilei troveblaj nur en PDF-versio, senpage elŝuteblaj el la retejo mem de la Sekcio kaj ankaŭ el <www.gazetejo.org>.

Ordinare la revueto eldoniĝas po 150 ekzempleroj ĉiunumere, kiuj estas dissendataj al sekciaj membroj, kunlaborantoj, edukantoj kaj kelkaj E-grupoj.

Prizorgas ĝiajn eldonkostojn eldonejo Oportuno, unu el la partneroj de la Sekcio, ĝis tiu ĉi povos iam mem eldoni ĝin.

Instigate de peto de kelkaj kolektemuloj, ni provos eldoni, en la unuaj monatoj de la proksima jaro, kolekton (en plaĉa skatoleto) de jam eldonitaj Brazilei (10 aŭ 12 n-rojn, depende de la eldonmonato). Por ke ni antaŭkalkulu la kiomon da ensembloj, ni petas, ke interesatoj akiri tian kolekton antaŭmendu ĝin per sendado de mesaĝo al <revuo@ileibr.org>.

Ĝuu la ĉi-numeran enhavon kaj ĝis la proksima!

Plej multaj kursgvidantoj de Esperanto, ĉu pro nescio pri jam ekzistantaj lerniloj, ĉu pro malkontento pri tiuj lernejoj surmerkataj, iam pensis krei sian propran lernilaron. Kelkaj sukcesas, post multjara eksperimentado, fosi sian sulkon kaj venigi sian verkon en la enlandajn kursejojn. Aliaj ne kuraĝas persisti tiom longe kaj preferas amatore multoblige siajn leciontekstojn, postlasante ĉe siaj lernantoj tiun impreson, ke mankas bonaj lerniloj en Esperanto, malgraŭ ties 120-jariĝo.

Tria grupo de lernilo-aŭtoroj foje sukcesas fosi sian sulkon eĉ pli malproksimen: publikigi sian lernilon per enlanda prestiĝa neesperantista eldonejo. Marco Antônio apartenas al tiu grupo. Ne plu dezirante malbone impresi siajn lernantojn per multobligajoj, kaj ne akceptinte favoran eldonproponon de esperantistaj eldonejoj, li proponis la originalon de sia pli ol 300-paĝa lernilo “Esperanto: baza kurso” al la eldona stablo de Ŝtata Universitato de Sankta Katarino, kiu eldonis la verkon kaj ĝin distribuas en prestiĝaj enlandaj librovendejoj. Legu la intervjuon kaj ekkonu iom pli pri la aŭtoro kaj lia laboro.


spertulo



Marco Antônio Ferreira Teixeira

Naskiĝis en Florianopolo, en la ŝtato Sankta Katarino, en 1965. Bakalaŭro kaj licenciulo pri Filozofio ĉe Federala Universitato de Sankta Katarino. Estis titolita profesoro pri Filozofio de la Ŝtata Sekretariejo pri Edukado en la ŝtato Sankta Katarino. Membro de la Akademio pri Filozofio de Sankta Katarino. Eksa prezidanto de Esperanto-Asocio de Sankta Katarino kaj plurfoja estrarano de Kultura Fondaĵo Simpozio, fondita de prof. Evaldo Pauli en 1988, kiu subtenas la plurlingvan retrojekton Filozofia Enciklopedio Simpozio. Nuntempe li laboras kiel juĝeja oficisto ĉe la subdistrikta baloto-juĝejo en la ŝtato Suda Riogrando.

Brazilei: Pro la konata lecionrezigno fare de kursanoj, aŭtoroj de lerniloj pli kaj pli emas maldikigi siajn lernolibrojn. Per publikigo de via 390-paĝa *Esperanto Baza Kurso*, vi laŭiras malsaman vojon. Kian lernantaron via verko celas kaj kiom longe la kurso daŭru?



Marco Antônio: Mia sperto kiel memlernanto de Esperanto kaj mia vivsperto koncerne lernadon de multaj aliaj aferoj, garantias al mi, ke kiam iu deziregas fakte lerni ion, tiu ne fortimiĝas antaŭ kiomo da lernotaĵoj; male, ŝajnas al mi, ke vera deziranto kutime serĉas pli kaj pli da konoj kaj informoj. Tial mi pensas, ke la libro organizita de mi celas tiujn, kiuj vere deziras lerni nian karan lingvon Internacian.

Pri la daŭro de la kurso, pere de *Esperanto Baza Kurso*, mi pensas, ke tio certe dependos de apartaj kapablo kaj personeco de ĉiu leganto de la lernilo. Tamen, pro la maniero kiel la libro estis organizita, mi riskas diri, ke, eble, en la sama tempo necesa por trastudi malgrandan E-lernilon, oni povus ankaŭ trastudi tiun lernolibron *Esperanto Baza Kurso*, kaj tiu ĉi karaktero de la verko eĉ estas reliefigita en la koncerna enkonduko de la libro.

Brazilei: Kial vi decidis laŭiri tian vojon?

Marco Antônio: Mi decidis iri laŭ tia vojo, ĉar mia sperto kiel memlernanto de Esperanto montris al mi, ke bona maniero lerni nian lingvon povas esti la sinteno havigi al ni plenan konon pri ĉiuj strukturaj elementoj de Esperanto, nome la 16 Reguloj, afiksoj, korelativoj, prepozicioj, konjunkcioj, primitivaj adverboj, baza vortaro kaj facilaj legaĵoj. Mi povas certigi, ke *Esperanto Baza Kurso* ja entenas tian karakteron kaj laŭorde prezentas, por ĉiu unuo de la menciitaj strukturaj elementoj, bazajn ekzempligajn E-frazojn,

ĉiam akompanatajn de la koncernaj tradukoj en la portugala lingvo, kio ja tre multe faciligas la laboron de la lernanto.

Brazilei: Ordinare Esperantaj libroj estas eldonataj de movadaj eldonejoj aŭ de la aŭtoro mem. Vian libron publikigis la eldona stablo de Universitato Sankta Katarino. Kiel vi sukcesis tion?

Marco Antônio: Mi sukcesis publikigi la lernolibron *Esperanto Baza Kurso* ĉe Federacia Universitato de la Ŝtato Sankta Katarino, tial ke, unuflanke, la direktoro de la koncerna eldonejo, Profesoro Alcides Buss, estas homo kiu jam havis tre bonajn informojn pri la ekzisto de Esperanto kaj pri ĝia literaturo; aliflanke, je la okazo de mia alirolado al la eldonejo, mi prezentis, ŝajne, bonkvalitan verkon jam tute pretan por eldono. Fakte, oni povas diri, ke al mi venis treega bonŝanco.

Brazilei: Nuntempe ĉirkaŭ dek Esperantaj verkoj, inter kiuj via lernilo, estas akireblaj per prestiĝaj enlandaj librovendejoj kaj per la fama retbutiko *Submarino*. Tio igas vin unu el tiuj malmultaj Esperantaj aŭtoroj konataj ekster la esperantista movado! Ĉu vi opinias, ke, se iu esperantista eldonejo publikigus vian libron, tio okazus?

Marco Antônio: Jes, mi opinias, ke tio tre facile povas okazi al iu ajn E-verko, kaj mi pensas, ke, por ke tio okazu, sufiĉas, ke eldonantoj kaj aŭtoroj strebu prezenti siajn verkojn al libro-vendejoj.

Brazilei: Dum kelkaj jaroj vi estis helpanto de Prof. Evaldo Pauli, eldonisto de la Esperanta Filozofia revuo Simpozio. El kio konsistis via helpado kaj kiu(j)n sperto(j)n ĝi havigis al vi?

Marco Antônio: Dum ĉirkaŭ dek jaroj mi kunlaboris kun profesoro Evaldo Pauli, en Florianópolis; dum tiu tempo mi estis ĝenerala sekretario de Kultura Fondaĵo Simpozio, fondita de Pauli, kaj samtempe mi deĵoris kiel konstanta reviziisto de la tekstoj publikigitaj en la Filozofia Revuo Simpozio, krom prizorgadi la presigon de ĝia materialo.

Brazilei: Vi diplomiĝis pri Filozofio. Ĉu viaj studoj pri tiu fako iel influis vian agadon por Esperanto aŭ, male, la movada sperto iel influis vian decidon studi tiun fakon?

Marco Antônio: Mia intereso pri filozofio naskiĝis ĉe mi ekde kiam mi estis 14 - 15 jara, eble pro influo de aŭtoroj beletraj, kiujn mi legadis tiame; ja kelkaj el ili estis tre filozofiemaj, kiel Camus, Morris West, Niĉeo kaj multaj aliaj. Kiam mi finis la abiturientajn studojn, mi estis firme decidinta eniri la filozofian kurson de Federacia Universitato Sankta Katarino, kaj tion mi ja faris; fine, post iom da tempo, mi diplomiĝis, estiĝinte bakalaŭro kaj lektoro pri filozofio.

Brazilei: Pro via transloĝiĝo kaj nuna laboro, vi skribis, ke nuntempe vi ne havas tempon aranĝi kaj gvidi kurson en via nova urbo. Vi tamen profitas kiel eble plej multe viajn liberajn horojn por tradukado. Parolu iom pri viaj tradukaj laboroj.

Marco Antônio: Nuntempe mi aparte sentas ian fortan impulson, kiu diras al mi, ke mi devas instrui E-on en la nuna loko, kie mi loĝas; eble tia sento venas de la cirkonstanco, ke mi sentas solecon rilate al E-o. Ja ĉi-loke mi ne konas aliajn parolantojn de la lingvo. Mi havas en mia kapo apartan projekton koncernan al tiu afero, tamen, ĝis la ideo realiĝos, mi preferas silenti pri ĝi. Mi, jam de kelka tempo, entreprenadas kelkajn traduklaborojn en Esperanto kaj mi povas diri, ke, kvankam la laboro estas al mi tre agrabla, foje ĝi ne estas facila, pro tradukproblemoj, kiujn ĉiuj tradukistoj alfrontas. Inter aliaj streboj, mi dumlonge laboras super la tradukado de *“Brazila Ekonomia Formado”* (Formação Econômica do Brasil), verko de Profesoro Celso Furtado; tiu verko estas preskaŭ entute tradukita de mi, tamen,



estas necese reviziadi la tekston kaj pridiskuti kun E-lingvaj amikoj kelkajn elektojn, kiujn mi devis fari koncerne la tradukon de iuj terminoj.

Brazilei: Kiu esperantisto, verko aŭ okazintaĵo multe influis vian esperantistiĝon?

Marco Antônio: Mi fariĝis parolanto de Esperanto pro tute hazarda okazaĵo, jena: lam, antaŭ 15 jaroj, mi iris en la domon de iu amiko, en Florianópolis; Tiam mi trovis libro-kurson de Esperanto sur etaĝero, en la domo de tiu amiko; la libro altiris mian atenton, kaj la afero ŝajnis al mi tiel interesa, ke mi prunteprenis la libron el mia amiko. Post tri monatoj da solula studado mi fariĝis tre flua E-parolanto.

Brazilei: Vi aŭtoras lernolibron, per kiu vi mem gvidis plurajn kursojn. Ĉu tio igis tiujn lecionojn pli profitdonaj?

Marco Antônio: Ŝajnas al mi, ke la lecionoj, kiujn mi havis la okazon prezenti al gelernantoj, fakte helpis al mi je la plibonigo de la materialo kiun mi estis pretiginta. Dum lecionoj klasoĉambraj, foje lernantoj demandas al vi pri apartaĵoj, pri kiuj vi ne estis rekte pensinta kaj metinta en la lernolibron, kaj tiam vi do ja havas la okazon pensi pri eble grava demando, flanke de la lingvo-lernado, kaj tio, fakte, multfoje jen okazis al mi.

Brazilei: Kion vi konsideras farinda kaj kion evitinda koncerne instruadon?

Marcos Antônio: Farinda, jen ĉiam instigi gelernantojn al parolado en Esperanto. Evitinda, ĝenerale, pure gramatika kurso. Eble, ja estas konsilinde intermiksi la du aferojn: parolado kaj gramatiko; mi pensas, ke tia ja estas temo jam de multe pripensita de lernantoj kaj instruistoj.

Ĉu Esperanto evoluas sane?

Prof. Sylla Chaves



La legado de BRAZILEI estas ĉiam instiga por mi. Ŝajne por kontraŭstari, sed fakte por komplementi. Ĉefe pri temoj, kiuj tre koncernas engaĝitan verkiston kaj vortariston, kiel mi estas nun. Antaŭ nelonge tiklis min artikolo de Tenorjo pri “artifikoj por eviti konsulton al vortaro dum legado”. Mi respondis, proponante, “kial kaj kiel uzi vortarojn dum legado”. Ĉi-foje temas pri respondoj al trafikaj demandoj de BRAZILEI fare de spertulo Emerson Werneck, magistro pri lingvistiko kun fokuso en leksikologio.

Denove instigite, mi eĉ havigis por mi elŝuton de la magistra disertaĵo de Werneck (priskribanta la formadon de neologismoj en Esperanto) por posta atenta legado. Sed mi nun pritraktos nur la diraĵojn en lia interesa intervjuo. Precipe tiklis min la diroj, 1. ke (almenaŭ por portugallingvanoj) Esperanto estas “la plej facila lingvo”, “pro la simileco de la vortstoko kaj la gramatiko”; 2. ke “neologismoj ne estas malamikoj de la bona lingvo, sed kontraŭe”; 3. ke “vaste legataj aŭtoroj” “nur sugestas vortojn, kaj la geparolantoj decidas uzi ilin aŭ ne”; 4. kaj ke “la geparolantoj estas suverenaj en tiu kampo – **NUR ILI DECIDAS**, kiuj vortoj daŭros ene de la lingvo”. Tiuj du lastaj asertoj estis faritaj sen distingo inter etnaj lingvoj kaj Esperanto.

Konsiderante ĉefe tiujn citaĵojn, sendepende de la cetero de la intervjuo, mi devus konkludi, ke mi estas stulta, agante, kiel ENGAĜITA VORTARISTO, kaj devus nur serĉi kaj registri la decidojn

de la “suverenaj geparolantoj”. Kaj ke mi povus krucigi la brakojn, ĉar, danke al tiu senkontrola suvereneco, Esperanto evoluas sane, laŭ la “vojo celita” de Zamenhof. Mi tamen atente legis la tuton, kaj NE konkludas tion. Kaj krome opinias, ke – por la profito de la leganto – valoras la penon substreki kelkajn punktojn, kiuj forestis el la intervjuo aŭ ne ricevis tie sufiĉan emfazon.

ĈU LA PLEJ FACILA LINGVO POR PORTUGALLINGVANOJ VERE ESTAS ESPERANTO?

Certe ne! Ne Esperanto, sed la hispana. Same kiel por norvego estas la sveda kaj por bulgaro la rusa. Similo inter la du lingvoj, kaj graveco kaj aŭskultateco de la hispana, igas ĝin 90%-e komprenebla de mezklera brazilano eĉ antaŭ eklerno. Dume Esperanto bezonas esti lernata ekde la komenco. Nur tre naivaj Esperanto-propagandistoj asertas, ke la Esperanta demando “Kiel vi fartas?” estas pli facila por brazilano ol “¿Cómo está usted?”



Nur la evoluo de la lernado ĉiam favoras Esperanton kompare kun etnaj lingvoj. Precipe se vortaristoj, instruistoj kaj verkistoj ne konspiras por forĝi “eternajn balbutulojn”. Survoje al ellernado, etnaj lingvoj fariĝas pli kaj pli malfacilaj. Kaj Esperanto mirakle fariĝas pli kaj pli facila, se oni konstante uzas la geniajn eltrovaĵojn de Zamenhof, kaj se oni ne lasas solaj la geparolantojn, kiuj bezonas daŭran helpon kaj bonajn sugestojn.

Taŭge helpate, brazila E-lernanto povas rapide atingi sian nivelon de kono en la hispana. Kaj poste transiri ĝin, kun grandegaj avantaĝoj. Tamen, en la unuaj tagoj, nepras konfesi, ke por brazilano la hispana lingvo estas la plej facila.

RELATIVAJ FACILO KAJ MALFACILO DE ESPERANTO

Ĉiu lingvo estas malfacila, ĉar ĝi rilatas al homaj pensado kaj komunikado – plej komplikaj konsciaj funkcioj de la homa korpo (aŭ spirito, ne gravas). La genia eltrovo de Zamenhof estis minimumigi tiun malfacilon en du kampoj – gramatiko kaj vortprovizo. Ni pritraktu ambaŭ aparte. La gramatiko de Esperanto havas malmulte da reguloj kaj eĉ malpli multe da esceptoj (kelkaj eĉ preferas mensogi, ke ĝi estas senescepta). Tial oni povas relative rapide lerni la gramatikon, kaj koncentriĝi en la lernado de la vortprovizo (ĉiu laŭ siaj konoj kaj bezonoj). Kaj iom da logikeco kaj internacieco en tiu vortprovizo faciligas ĝian lernon kaj postan memorigon. Sed tio ne estas senpena laboro, ĉar vortoj ne naskiĝas gluitaj al siaj signifoj, kaj sinonimoj, homonimoj kaj plursignifaj vortoj estas nepraĵoj en la evoluo de ĉiu lingvo. Kaj falsaj amikoj estas nepraĵoj de plurlingveco. Zamenhof metis geniecon en sian lingvon, sed ne magian bastonon.

Dum la evoluado de lingvo, gramatiko ŝanĝiĝas tre malrapide. Sed vortprovizo bezonas konstante kreski kaj adaptiĝi al la evoluo de la mondo kaj de la komunik-bezonoj de la lingvo-uzantoj. Tion

magistro Werneck bone konstatis kaj dokumentis. Nepras konkludi, ĉu tio okazas senpene, nature kaj sane. Tiu pritrakto estas la ĉefa celo de tiu ĉi artikoleto.

PLEJ GRANDAJ DIFERENCOJ INTER ETNAJ LINGVOJ KAJ ESPERANTO

Ne necesas aserti, ke Esperanto naskiĝis por fariĝi lingvo de paco, egale kaj neŭtrale apartenanta al la tuta homaro. Tiu intenco de Zamenhof estas bone konata, sed ne bone sekvata de la esperantistaro. Kiam ajn okazas malpaco inter esperantistoj fariĝas pli malfacile konvinki homojn, ke nia lingvo helpas konstrui pli bonan mondon. Tiu punkto estas gravega, sed estas for de nia hodiaŭa temo. Ĝi pli rilatas esperantismen ol Esperanton, kaj pli dependas de analizo de la esperantistaro (konsistanta el homoj, ne el sanktuloj). Nun nepras analizi la esperantistaron nur en siaj rilatoj kun la lingvo mem, ne en la homaj rilatoj de unuj kun la aliaj. Tiucele esperantistoj estas klaseblaj en tri ĉefaj kategorioj:

Kategorio 1 – apogantoj de Esperanto. Ili estas multaj milionoj. Eĉ dekoj aŭ centoj da milionoj. Sufiĉas koni la vivon de Zamenhof kaj liajn idealojn, por rimarki ke ili estas apogindaj. La dubo estas, ĉu ili estas realigeblaj aŭ ne. Ĝi ne kontraŭas etnajn lingvojn. Eĉ propedeŭtike faciligas ilian postan lernadon, kiel pruvis eksperimentoj faritaj en Paderborn kaj aliloke. Oni povas ami lingvojn ĝenerale, kaj kelkajn speciale. Sed Esperanto meritas pli altan taksadon pro sia interna ideo kaj pro la lingvaj karakterizoj, kiujn Zamenhof metis en ĝin.

Kategorio 2 – lernintoj de Esperanto, laŭ la kalkulo de la disvendo de vortaroj kaj lernolibroj kaj enskribiĝoj en E-kursoj. Ili estas multe pli ol miliono, sed la plimulto restas for de la movado pro seninteresiĝo (eĉ se ili bone lernis). Pli granda kvanto atingis

nur balbutan nivelon. Bedaŭrinde tiuj lastaj ŝatas surbrustigi verdan stelon, flirtigi E-flagojn kaj balbuti laŭte kaj publike. Malfacilas decidi, kia propagando estas pli fuŝa, ĉu tiu de la interbatalantoj en Esperanto (kiuj montras, ke ĝi NE estas lingvo de paco) aŭ tiu de la surstrataj balbutuloj (kiuj montras, ke ĝi NE estas facila). Se oni konsideras ilin Esperanto-parolantoj kaj atribuas al ili la rajton decidi, kiuj vortoj restos en la lingvo kaj kiuj foriros, oni mortopunos ne la maltaŭgajn vortojn, sed Esperanton mem, kiu ne firmiĝos, kiel vera lingvo.

Kategorio 3 – agantaj kaj perfektigemaj uzantoj de la lingvo. Inter ili estas instruistoj, verkistoj, vortaristoj, prelegantoj kaj ankaŭ simplaj legantoj, preleg-aŭskultantoj kaj seriozaj uzantoj de la lingvo. Ili estas malmultaj, malsamnivelaj, sed meritas la kolektivan rajton decidi pri la estonto de la lingvo, inkluzivante ĝian vorto-trezoron.

Por etnaj lingvoj oni devas konsideri ĉiujn lingvo-parolantojn samrajtaj konstruantoj de la lingvo, ĉar (volonte aŭ kontraŭvole, riĉe aŭ malriĉe, saĝe aŭ malsaĝe) ili ĉiuj alportas brikojn por la konstruado. Bonaj verkistoj, instruistoj kaj vortaristoj ne rajtas malhumile rifuzi ilian rajton kundecidi pri la pluvivo aŭ morto de vortoj.

Esperanto ankaŭ estas vivanta lingvo, kaj ĉiuj apartenantoj al kategorio 3 partoprenas en la evoluo de la lingvo. Kategorioj 1 kaj 2 nur estu konsiderataj pro sia eblo iam pligrandigi la dekmilojn en kategorio 3. Ili bezonas grandan flegon kaj varton. Sed kategorio 3 meritas respekton.

Aldone estas alia granda diferenco inter Esperanto kaj etnaj lingvoj, kun unu sola escepto – la hebrea, antaŭ la kreo de Israelo. **ESPERANTO ESTAS DIASPORA LINGVO**. Elirante el sia diasporo, Israelo longe okupis multe da spertuloj por la adapto de sia nacia lingvo al ĉiutaga kaj ĉiufaka uzado. Esperanto ankaŭ bezonas tion. Kaj vortaristoj, kiuj rekonas sian respondecon kaj klopodas iom gvidi la uzadon de vortoj, ne estas stultaj, sed klarvidaj.

ĈU ESPERANTO EVOLUAS SANE?

Finfine, ni provu respondi la demandon, kiun mi starigis. Sed la respondo devas esti samtempe JES kaj NE.

JES, se ni kontentiĝas kun la nuna situacio: diaspora sed morale elita komunumo, kiu mezbone interkompreniĝas kaj interamikiĝas tra la tuta tersurfaco, partoprenante en mondkongresoj kaj komunikiĝante pli kaj pli efike, danke al la konstanta pliboniĝo de modernaj komunikiloj, kiel Interreto. JES, se la idealo de Zamenhof estas for de niaj konsideroj, dum la malfacilo kaj dispecigo de la lingvo kreskadas malrapide sed konstante, kiel la nivelo de la oceanoj pro la varmiĝo de nia planedo.

"NELGE EN NIA VILAĜO
APERIS MINCULO DIRTE VESTITA.
LI NE ESTIS MAVA VIRO,
MALGRAŬ LIA TURPA ASPEKTO.
LI VOLIS NUR HANĜRI.
LA STIFFILINO DE LA NAJBARIĈO
VENIS ĜIS LI KAJ...!"

(*)



NE, se ni volas, ke Esperanto restu kandidato por fariĝi la lingvo de la Tria Jarmilo. Kiel la ekologiistoj, ni devas ne nur registri, sed AGI. Ili, kontraŭ la senrespondeca monavido de la potencaj industriistoj kaj la pasiveco de la konsum-socio. Ni, kontraŭ la malfaciligo kaj dispecigo de la lingvo, dum senkontrola kresko kaj uzado de nepravigeblaj neologismoj.

Ni ne devas refariĝi kavernuloj, sed bezonas bremsi la varmigon de la planedo, defendi ekologiajn sistemojn kaj rekonstrui vere agrablan mondon por niaj posteuloj. Ni ne devas kontraŭi la evoluon de la lingvo, sed bezonas batali por ke tiu evoluo okazu orde, por ke riĉeco ne transformiĝu en malsimpleco kaj displitiĝo.

Resume, Esperantaj verkistoj kaj vortaristoj ne nur sekvu la senordan evoluon de la lingvo, sed AGU, kiel la saĝaj ekologiaj verduloj. Ni estu la saĝaj lingvaj verduloj. Ankoraŭ estas tempo por savi la mondon. Kaj ankoraŭ estas tempo por savi nian lingvon.

Kiel mi diris komence, mi estas engaĝita verkisto kaj vortaristo. Mi ne akceptos, ke Esperanto perdu sian simplecon, se mi povas indiki la bonan vojon al tiuj, kiuj ne klare vidas ĝin. Mi konscias, ke mi ne rajtas kaj ne povas ordoni. Zamenhof ne volis, kaj Waringhien ne sukcesis tion fari. La Akademio, ankaŭ ne. Sed montri la bonan vojon estas mia rajto kaj devo.

Mi estas konvinkita, ke mia malkonsento kun magistro Werneck estas nur ŝajna, nur vorta, ĉar ni egale volas kontribui por ke la evoluo de Esperanto ne detruu ĝian denaskan simplecon kaj taŭgecon por la tuta mondo.

(*) En ordinara Esperanto:

“Antaŭ nelonge en nia vilaĝo aperis maldikulo malpure vestita. Li ne estis malbona viro, malgraŭ lia malbela aspekto. Li volis nur manĝi. La duonfilino de la najbaro venis ĝis li kaj ...”

Brazila E-gejunularo refazonigas sian organon

Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) relanĉis novan version de sia organo *Momenton!* La nova eldono prezentas avangardan grafikaranĝon kongruan kun la postulemo de nuntempaj legantoj. Laŭ la nova ĉefredaktanto, Lucas Vignoli, pro financa situacio de la organizo, la aperitimo de la revuo estos sesmonata.



Lernolibroj estas gravaj por enkondukaj studoj de lingvoj, sed legaĵoj, kiaj revuoj, estas nepraj por ke lernantoj perfektigu siajn sciojn pri la lernata lingvo. La skipo de Brazilo gratulas la novan redaktoteamon de *Momenton!* kaj deziras fruktodonan rikoltojn de legantoj.



De kelkaj semajnoj Kultura Kooperativo de la Esperantistoj, en Rio, alvokas lernantojn plibonigi siajn sciojn pri Esperanto per kreema kaj instiga invito: Ĉu vi volas forlasi definitive la klason de la “eternaj komencantoj”? Estas simple. Frekventu ĉiumerkrede, de la 6-a ĝis la 8-a, la Konsversacia Klubo de KKE, gvidatan de nia kompetenta samideano JAIR SALLES, aŭtoro de la metodoj “Esperanto Conversacional” kaj “La Konsversacia Klubo”. La kuraĝiga invito diskoniĝas ĉefe en ĝia diskutlisto <<http://br.groups.yahoo.com/group/kke-diskutlisto>>.

Ĉu ankaŭ via kursejo kampanjas iun instigan lernagadon? Raportu pri ĝi en Brazilo. Ju pli vi raportos pri viaj instruigaĵoj, des pli vi instigos aliajn kursgvidantojn aliloke multobligi tiajn neprajn aktivadojn.

Esperanto en plia enlanda universitato



Por instigi studadon de fremdaj lingvoj en Universitato Severino Sobral, en la urbo Vassouras/RJ, esperantistoj el la urbo Triveroj, starigis propedeŭtikan kurson de Esperanto, kiu daŭris de aŭgosto ĝis septembro 2008 ĉiumerkrede vespere. La kurso celis lernantojn pri Beletro kaj ĝin gvidis la advokato Carlos Valle kunhelpe de Jorge Link kaj Luiz Alberto. Pliaj informoj portugale: <http://www.uss.br/web/page/noticiasdetails.asp?cod=431>

Krom tiu instruprojekto, anoj el Trivera Esperanto-Klubo de kelke da tempo prizorgas instruagadon en jenaj publikaj lernejoj kaj edukejo: ŝtata lernejo Gafino Rio Novo, ŝtata lernejo Moacyr Padilha kaj Kleriga Centro Vila Isabel.

La Kleriga Centro Vila Isabel, per iniciato de la instruisto pri Matematiko, Cláudio Bonfante, ĉi-jare proponas kurson de Esperanto al siaj lernantoj de la 5-a ĝis la 8-a klasoj. Laŭ informo de Luiz Alberto de Oliveira, sekretario de Trivera E-Klubo, la lingvo estas devige instruata al 106 geknaboj dividitaj en 4 klasojn. Pro transloĝiĝo de la kursgvidanto Cláudio Bonfante al alia urbo, transprenis la gvidadon la agema esperantisto kaj ankaŭ instruisto pri sorobano (japana globkalkulilo), Jorge Link.

Cláudio Bonfante lernis infanaĝe la lingvon de Luiz Alberto de Oliveira en publika lernejo.

Laŭ raportoj de Marilene Azevedo kaj Luiz Alberto, kiu sendis ankaŭ la foton.

PLIRIĈIGU VIAN VORTOPROVIZON

Joseo Tenorjo

Ni dediĉas ĉi tiun vortprovizon al la centjariĝo de la japana enmigro en Brazilon, kies celebradon oni memorfestas ĉi-jare. Multajn esperantigojn de japanaj vortoj vi jam konas: kimono, sakeo, ĵudo, karateo, hajko, akupunkturo, origamio, tatamo, ikebano, harakiro, tempuro k.a.. Kontrolu sube kiom multe vi scias pri esperantigo de japanajoj prenitaj el Enciklopedieto Japana, kompilita de s-ro T. Nakamura kaj eldonita de Kosmo, Osaka, en 1964.



1. Ĉanoj/o – A: skolo de budhismo por memiluminiĝo; B: ŝintoa preĝaro; C: te-ceremonio laŭ teoisma etiketaro; Ĉ: enhejma di-servado.
2. Geta/o – A: ornama kvadrata paperplato; B: lignoŝuo de kimona ensemblo por ĝenerala uzado; C: mato el rafinita tigoj el junko; Ĉ: belulino kiu servas klienton per trinkado, kanto kaj danco.
3. Daimi/o – A: bienulo en la feŭdaj epokoj de Japanio; B: militisto en antikva kaj feŭda epokoj; C: folkloro amfibiulo homsimila; Ĉ: Ŝoguna registaro en feŭdaj epokoj.
4. Haŝi/o – A: paro da manĝbastonetoj ordinare el ligno; B: speco de manĝo vaporkuirita; C: taseto por trinki sakeon; Ĉ: farĉitaj kuiritaj rizbuloj aŭ rizulaĵoj.
5. Jukat/o – A: dukorda muzikinstrumento; B: klasika hararangŝo de sinjorino; C: Larĝa kaj longa rubanda zono; Ĉ: somera kimono uzata post la vespera bano.
6. Kana/o – A: pentraĵa rulpendaĵo; B: nom-stampilo uzata kiel 'subskribo'; C: sistemo por transkribo de japanaj silaboj; Ĉ: principaro de religia kredo.
7. Kend/o – A: sindefenda lukto kontraŭ surpriza atako; B: dolĉe bakita kuketo el rizfabo; C: ornama sonorileto el metalo; Ĉ: jantipa batalsporto per pikarmilo.
8. Rikiŝ/o – A: fajropelvo kun braĝoj por varmigi la manojn; B: durada veturilo tirata de homo; C: frandebla fungo; Ĉ: speco de riverfiŝo simila al karpoo.
9. Bunrak/o – A: klasika simbolisma dramo kun kanto kaj danco; B: tradicia pup-teatro el la Edo-epoko; C: japana klasika teatraĵo; Ĉ: antikva kortega muziko.
10. Ŝogun/o – A: titolo de ĉefo de samuraja klaso; B: titolo de la japana regnestro; C: japana ŝakludo; Ĉ: politika divido de Japanio en prefektejoj.

PLIRIĈIGU VIAN VORTOPROVIZON

Respondoj

1. **Ĉanojo** – [C] te-ceremonio laŭ teoisma etiketaro. [Opcio A = zeno]; [Opcio B = norito].
2. **Getao** – [B] lignoŝuo de kimona ensemblo por enhejma uzado. [Opcio Ĉ = gejŝo].
3. **Daimio** – [A] bienulo en la feŭdaj epokoj de Japanio. [Opcio B = samurajo]; [Opcio Ĉ = bakufo].
4. **Haŝio** – [A] paro da mang-bastonetoj ordinaraj el ligno. [Opcio Ĉ = saŝio].
5. **Jukato** – [Ĉ] somera kimono uzata post la vesperbano. [Opcio A = jakumo-kotoo].
6. **Kanao** – [C] sistemo por transkribo de japanaj silaboj. [Opcio A = kakemono]; [Opcio B = sigelilo].
7. **Kendo** – [Ĉ] japantipa batalsporto per pikarmilo. [Opcio A = aikido]; [Opcio C = furino].
8. **Rikiŝo** – [B] durada veturilo tirata de homo. [Opcio A = hibaĉo]; [Opcio Ĉ = karaso].
9. **Bunrako** – [B] tradicia pup-teatro el la Edo-epoko. [Opcio A = No-o]; [Opcio C = kabuko]; [Opcio Ĉ = gagako].
10. **Ŝoguno** – [A] titolo de ĉefo de samuraja klaso. [Opcio B = teno-o]; [Opcio C = ŝogio].



Kontrolu vian memtaksadon:

Malpli ol tri trafaj respondoj: vi nepre bezonas legi iom pli.

3 – 4: **kontentiga**; 5 – 7: **bona**; 8 – 10: **bonega**

Lerninda letereto



Imagu, ke la suban letereton skribis unu el viaj lernantoj. En ĝi enestas 40 oftaj eraroj (gramatikaj, sintaksaj kaj leksikaj), kiuj suferigas brazilanojn. Kian leteron vi redonus al la skribinto cele helpi lin/ŝin kompreni siajn erarojn?

Ni invitas vin elpinĉi la erarojn, korekti kaj komenti ilin. Poste sendu ilin al nia redaktejo. La tri unuaj sendintoj de korektaj komentoj (por ĉiuj 40 misgлатаĵoj), gajnos libro-premion aŭ abonon de Brazilei. Komentoj aperos en la sekva n-ro de la revueto.

Kara amiko,

La libro, kiu vi sendis estas tre bela.

Mi ekkomencis legi ĝin antaŭ du tagoj kaj sia rakonto ŝajnas interesan. Multaj vortoj mi ankoraŭ ne konas kaj tial mi necesas iri plurfoje al vortaron. Sed konsultante la vortaron, ĉiam aperas novajn vortojn kaj tiu iom malkuraĝas min.

Sabato, dum ni parolis pri legado, vi diris, ke se mi atentus ne nur la tekston, sed ankaŭ la kuntekston, mi ne bezonus tiel ofte konsulti vortaron. Mi jam tentis tion, sed legi sen vortaro estas tre malfacila.

Mi volus scii, se en via domo havas libron kun pli facila tekstoj por ke mi povos legi ĝin. Kiel mi estas aventurema, al mi plaĉas libron, ke rakontas pri aventuroj. Mi memoras interesan libron — bedaŭrinde mi forgesis ĝian nomon - verkita de iu franco jam mortita. Se tia libro havas vin, mi ŝatus legus ĝin.

Morgaŭ mi iros en la kursejo. Se vi ankaŭ partoprenos de la leciono, bonvolu portu la libreton. Mi esperos vin ĉe la bushaltejo kaj tien mi restos ĝis kiam vi alvenos.

Brakumo,
komencanto



(1839 - 1908)

MACHADO DE ASSIS

Cele omaĝi la plej elstaran enlandan verkiston, okaze de la 100-jariĝo de lia forpaso, Brazila Akademio de Beletro, kunagade kun Ministrejo pri Kulturo, proklamis la 2008-an *Nacia Jaro Machado de Assis*. Per tio oni intencas proksimigi brazilanojn, eĉ iom pli, al la kreinto de protagonistoj kiaj *Bentinho*, *Capitu*, *Brás Cubas* kaj multaj aliaj kiuj reprezentas parton de la brazila kulturo. Brazilei omaĝas, per du el niaj konataj edukistoj, la plej grandan geniulon en la brazila beletro.

Machado de Assis laŭ Prof. Geraldo Mattos, akademiano:

“Inter liaj meritoj mi devas citi la enkondukon de Realismo en nian literaturon per la romano *Postmortaj Rememoroj de Bras Kubas* (1881) kaj la fondon de la Brazila Akademio de Beletro (1896), kies unua prezidanto li fariĝis. Apartan rimarkon mi donu al tio, ke li kreis novan fikcian tipon, nomatan “kroniko”, kiu estas mallonga leĝera senintriga noveleto pri ĉiutagaĵoj, kiun pluraj aliaj verkistoj abunde kultivas ordinare unue en ĵurnaloj, kiel la kreinto, kaj poste en libroj.” (*)



Machado de Assis laŭ D-ro Paulo Sergio Viana, kiu mem jam tradukis kvin verkojn de la omaĝato:



“Oni apenaŭ povas decidi, per kia ĝenro plej perfekte esprimiĝis lia grandega talento - ĉu per romanoj, ĉu per rakontoj. Ĉar la aŭtoro estis malriĉa en sia infanaĝo, ĉar li frue fariĝis orfo, ĉar li estis mulato kaj epilepsiulo - eble tial li povis kapti ian apartan senton pri la vivo, pri la kunhomoj, kiun li transdonis per siaj historioj. Ironio, humaneco, humuro, iom da pesimismo kaj amareco, jen la ĉefaj trajtoj de lia prozo. Kvazaŭ li prezentus sian vidpunkton pri la homaro per ia malĝoja rideto, tute sen iluzioj. Lia stilo estas ĉiam simpla, eleganta, agrabla, kio metis lin sur la unuan lokon inter la brazilaj verkistoj ĉiutempaj. Same ni faras, antaŭ ol viziti teatron: ni vestas nin per plej eleganta kostumo, eĉ por spekti tragedion”. (**)

(*) El la enkonduko de *Dom Casmurro*, de Machado de Assis tradukita de Paulo Sergio Viana. Eldonejo Oportuno, San-Paŭlo, 2007.


(**) El la enkonduko de *La divenistino kaj aliaj rakontoj*, de Machado de Assis tradukita de Paulo S. Viana. Eldonejo Oportuno, San-Paŭlo, 2005.



Karikaturoj: Osmar

La kleriga flanko de la Esperanto-lernado

Prof. Geraldo Mattos,
akademiano
www.gmverda.com.br



Estas du solaj manieroj alveni al la scio: malkovri aŭ akcepti. Dum malkovri estas individua laboro, akcepti dependas de alia individuo.

Kiam ni malkovras, la ĝojo malkovri kompensas la laboron, kiun ni devis fari por sukcesi, kaj la rezulto estas tio, ke ni neniam forgesas. Se eventuale la memoro perfidas nin, estas tre facile denove refari la tutan vojon al la malkovro.

Kiam ni akceptas, senkonscie ni sentas ian ŝuldon al tiu, de kiu venis al ni la scio, kaj konscie ni devas peni por parkeri tion, kio estas donata de tiu, al kiu ni ŝuldas. Sekve de tio, efektive ni ne pagas mem kaj la rezulto estas la granda facileco forgesi, se temas pri tio, kio ne estas nia ĉiutaga laboro.

Lernado estas la rezulto de malkovro aŭ de akcepto.

Kaj mi ne parolis pri la studo.

La studo estas la peniga parto de la lernado kaj ĝi ne bone funkcias, ĉar la pago por la studo estas nur estontaj kompensoj, kiuj havas ege malfortan stimulon de tio, ke ili estas malproksimaj de la studanto. Evidente, kiam temas pri la regula instruado de infanoj kaj junuloj, la konduto de la instruistoj kaj de la familio povas fariĝi forta kompenso por la studantoj. La instruistoj volas, ke iliaj

lernantoj studu kaj sekve ili devas iel pagi al siaj lernantoj por ilia ŝajna tempoperdo: la plej facila maniero estas lasi la lernantojn malkovri kaj due disproporciigi la kvanton de la studo favore al la kvanto de la lerno.

Efektive, la plej bona instruo estus tia, kia trudus nenian laboron, sed plenan rezulton. Tio tamen okazas unu solan fojon en nia vivo: en sia familio, ĉiu infano lernas la lingvon kaj ĉiujn konojn de sia medio. La familia eduko estas ideala lernejo, en kiu la instruistoj — gepatroj kaj pli frue naskitaj gefratoj! — nur lasas siajn lernantojn malkovri: ĉion. Kion ni lernis tiam, tion neniu el ni iam forgesos.

La postaj instruoj devas celi kiel eble plej forte proksimiĝi al tiu genetika lernigo, kiu neniam malaprobos siajn lernantojn. Se ne estas eble imiti ĝin perfekte, almenaŭ estas necese estigi malegalegon inter la lerno kaj la studo: multe pli da lerno kompare kun tre malmulta studo.

Kaj nun mi iras al la temo de la nuna eseeto: La kleriga flanko de la Esperanto-lernado.

Mia unua observo estas tio, ke ĉiu lingvo estas kleriga: efektive, dum ni akiras lingvon, ni samtempe akiras la mondon, kiun ni konas pere de la lingvo, ĉar tio estas nur la lingvo, kiu faras niajn mondojn pere de siaj apartaj prezentoj de la realaĵo: ju pli distancaj estas la lingvoj, des pli distancaj kaj malsimilaj estas ankaŭ la popolaj sintenoj pri la mondo kaj pri la vivokonceptoj.

Esperanto havas du karakterojn, kiuj ĝin apartigas inter ĉiuj aliaj lingvoj: ĝia reguleco kaj kreolibereco.

Mi petas la permeson de miaj legantoj por ekzempli pri mi mem. Inter 1967 kaj 1972, la Pontifika Universitato Katolika de Paranao donacis la tutan matenon de lundo al vendredo, sekve dudek horoj, al du titolaj profesoroj, ke ili sin dediĉu al la lingvoesploro cele al gramatiko de la portugala lingvo: Prof. Eurico Back (1923-2003), mia instruisto en PUK kaj poste kolego, kaj mi.

Nia laboro estis fruktodona, ĉar en 1972 estis publikigita de la Mariista Eldonejo FTD nia Gramatiko de la Portugala Lingvo, kun 896 paĝoj.

La komparo inter la portugala kaj Esperanto permesis al mi malkovri, ke la portugala verbo ne havas tempojn (*) kaj ĝiaj pasivaj participoj havas homoniman morfemon. Kiam ni studis la verbon, mi komencis traduki la portugaliajn verboformojn al Esperanto, kaj la surprizo venis tiam, kiam tion saman mi faris ĉe niaj participoj. La finaĵoj *-ado* kaj *-ido* de la portugaliaj verboj povas esti estantaj aŭ estintaj participoj:

Portugala lingvo		Esperanto	
Infinitivo	Participo	Infinitivo	Participo
amar	amado	ami	amata
sentir	sentido	senti	sentata
marcar	marcado	marki	markita
atingir	atingido	atingi	atingita

Ni devas do rekoni, ke Esperanto permesas al ni pli nete konscii pri niaj gepatraj lingvoj. Estas facile konstati, ke la reguleco de Esperanto portas nin al pli klara konscio pri la devioj truditaj al niaj gepatraj lingvoj per iliaj miljaraj ekzistoj... Sen la komparo kun Esperanto, mi neniam alvenus al la dusenceco de la latinidaj kaj ĝermanaj participoj, ĉar estas du tipoj de verboj en la hindeŭropaj lingvoj: statoverboj [tipo *ami*], ĉe kiuj la fino de la fakto kaj ilia interrompo trudas la saman statomankon, kaj agoverboj [tipo *marki*], ĉe kiuj ilia fino havigas duan staton kaj ilia interrompo nur la revenon al la komenca stato. Se Kalocsay kaj Waringhien [Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, 4-a eld., p. 146-148. Rotterdam: UEA, 1980] lasus sin klerigi per Esperanto, ili ne alvenus al la fantaziaj

difinoj de verboj de daŭro kaj rezulto, verboj de daŭro sen rezulto kaj verboj de rezulto sen daŭro, krom la hibridaj. Ili povus veni al la samaj miaj decidoj, se nur ili bone atentus pri la du tradukoj ĉe la franca gramatiko de la Fundamento de Esperanto en la fino de la instruo pri verboj: ŝi estas amata de ĉiuj / la pordo estas fermita. Ili tamen pretervidis la fatalan duoblan dusencecon de la franca traduko: elle est aimée par tous / la porte est fermée...

Ĉar la reguloj pri la participoj estas pesimaj, la eraroj ĉie abundegas [Revuo Esperanto, n-ro 1216 (7-8). Julio-aŭgusto 2008, p. 168]:

Eleganta traduko de du klasikaj tragedioj, ege influantaj la eŭropan kulturon, form- kaj enhavfidela.

La verkinto pensas, ke li diris: ... kiuj ege influis. Li tamen – ho ve! – ion tute alian lasis eliri: ... kiuj ne plu influas / ne plu influanta. Influi estas havi efikon, memorigas nin fama vortaro [PIV, p. 474. Paris: SAT, 2005]: sekve, influinta estas havinta efikon: ne plu havanta influon...

Samtempe, la necesa reguleco de Esperanto kondukas nin al la penso, ke nepre ekzistas la aliaj participoj, la estinta ĉe la du unuaj verboj [*ami* kaj *senti*], kaj la estanta, ĉe la du lastaj verboj [*marki* kaj *atingi*], sed malofte uzataj pro siaj strangaj sencoj ĉe la du unuaj verboj kaj pro la ordinare neglektata senco ĉe la du lastaj de tio, ke estas tre malofta la bezono paroli pri la momentaj agoj de tiuj verboj:

Infinitivo	Participo	Senco
ami	amita	post la amo: ne plu amata
senti	sentita	post la sento: ne plu sentata
marki	markata	dum la momento marki
atingi	atingata	dum la momento atingi

Alia sinteno pri Esperanto naskiĝas en la unuaj semajnoj de ĝia lernado. Eble mi nun parolas pri miaj spertoj, sed estante instruisto de mi mem, tiam 16-jara, mi trovis strangaj multajn aspektojn de la nova lingvo: la manko de akordo inter subjekto kaj verbo, la malkolosa konjugacio kaj la vokala distingo de vortoklasoj inter aliaj. Kurioze, ke ĉiam plaĉis al mi la ĉapelitaj literoj...

Eble tamen la plej kleriga flanko de la lernado de Esperanto kuŝas en tio, ke la senescepteco de la lingvo akre kontrastas kun niaj gepatraj lingvoj kaj ĝia reguleco malfermas al ni la okulojn por la facileco, kiun tiela reguleco donas al ĝiaj parolantoj, kiuj povas formi multegon da novaj vortoj kun la sufiĉe malmultaj radikoj.

Se multaj komencas lerni kaj post kelka tempo haltas, abandonas kaj forgesas tiun novan sperton, tio ŝuldiĝas al la konsterna fakto, ke ili ne sukcesis transpaŝi tiun unuan periodon de komparo inter la troa riĉeco de la gepatra lingvo kaj la ŝajna malriĉeco de la nova lingvo.

Tiuj unuaj ideoj ne rezistas multan tempon, se ni plu studas kaj plu eniras en la spiriton de la verda lingvo. Se ni komencas traduki de nia gepatra lingvo al la internacia, ni ĝojas pro la ebleco transporti ĉion de nia lingvo – evidente per helpo de vortaro en tiuj fruaj monatoj. Kaj post kelkaj monatoj, se ni faros la inverson kaj provos traduki de Esperanto al nia familia lingvo, ni vidos, ke la malfacileco estas pli granda pro la elasta ĵonglebleco de la vortfarado.

Evidente, ĉiu lingvo havas ion, kion ne facile ni redonos en alia lingvo. Kaj tio ekzistas ankaŭ en Esperanto:

Kiel perfekte traduki en la portugalan la diferencon inter *liberigo* kaj *liberiĝo*, inter *tondi* kaj *tondigi* aŭ eĉ inter *iri* kaj *iradi*?

La plej granda miraklo farita de ĝia kreinto kuŝas tamen nur en tio, ke estas multo en Esperanto, kio ekzistas verŝajne en nenia

alia lingvo: se tio ne estas miraklo, mi ne plu kredas al mia Deino!
Kaj aperas du tiaj punktoj:

1 Kiu lingvo permesas rekoni la tri grandajn vortoklasojn per iliaj finiĝoj? Verŝajne nur Esperanto distingas siajn substantivojn, adjektivojn kaj verbojn.

2 Kiu lingvo pasigas per simpla regulo siajn vortojn de ĉiu el tiuj tri grandaj klasoj al ĉiu el la du aliaj? Ekzemplojn rapide mi trafos: ekzemplo [ekzempla, ekzempli] / rapida [rapido, rapidi] / trafi [trafo, trafa]. Kurioze, mi trovis antaŭ ol serĉi!...

3 Kiu lingvo posedas tian vortkunmetan flekseblecon, kies ellaboraĵoj fariĝas simplaj vortoj, kiuj sin facile submetas al la du supraj proceduroj?

Mi ĉiam antaŭpensas minore... per miskalkulo!

Pli ol evidente, ke post la unua monato de mia eklerno de Esperanto jam mi neniam eraris ĉe la morfologiaj kaj sintaksaj analizoj de la portugala...

Esperanto malfermas al ni novajn eblecojn de esprimoj, kaj ni do fariĝas pli riĉaj post ĝia posedo. Kaj ĝia plena posedo dependas nur de tio, ke nin ĝi posedu tutaj.

[*] Dum tri jaroj mi studis la portugalan verbon absolute sen ia rezulto, sed ĝin deĉifris en kvin minutoj, kiam mi instruis la rektan kaj la nerektan parolon en la Militista Kolegio de Kuritibo. Tiam mi vidis, ke luzaj verboformoj estas geedziĝintaj [amar: ami]: *amo* kun *amava* / *ame* kun *amasse* / *amar* kun *amasse* / *amei* kun *amara*. La kvar unuaj parolas pri io nefinita kaj la kvar lastaj pri io finita. La unuaj de la paro pri io ebla kaj la duaj pri io neebla: se *chover*, *fico em casa* [se pluvos, mi restos hejme: ebla pluvo]. / *se chovesse*, *ficava em casa* [se pluvus, mi restus hejme: neebla pluvo]. Mi krome malkovris, ke la 4-a kaj la 6-a formo estas homonimoj, ĉar ili estas edzinoj de apartaj edzoj: ili estas unuvitelaj ĝemelinoj... La formoj *amarei* [amar hei: mi amos] kaj *amaria* [amar ia: mi amus] estas kunmetitaj. [Noto de la aŭtoro]



comune di trieste
assessorato alla cultura

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Lanĉas

Internacian Konkurson - jaro 2008

pri la temo:

Kristnasko: bilde kaj poezie



Estas invitataj partopreni geknaboj el la tuta mondo, kun aĝo de 6 ĝis 14 jaroj, kiuj sendu, ĝis la 10-a de novembro 2008, siajn verkojn al jena adreso:

Esperanto Trieste - C.P. 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste, Italio

Oni rajtas kontribui per unu aŭ pli da verkoj pri la supre indikita temo, en la kategorioj:

- 1) **desegnaĵo**, maksimume unu A4-formata folio; 2) **poeziaĵo**.

La desegnaĵo havu komenton aŭ frazon en la internacia lingvo Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtor(in)o. La poeziaĵo estu en la internacia lingvo Esperanto kaj en la gepatra lingvo de la aŭtor(in)o. Por ĉiu verko estu ankaŭ indikitaj: *persona kaj familia nomoj; aĝo; lernejo kaj klaso; poŝta adreso*.

Se eblas, bonvolu aldoni malgrandan foton de la aŭtor(in)o.

Ĉiuj konkursaĵoj prezentigos al publiko dum la kristinaska periodo 2008. La vizitontoj kaj elektota ĵurio donos poentojn al la plej bela verko el la du kategorioj.

Oni anoncos la premiitojn, laŭ kategorio kaj aĝo (de 6 ĝis 8 jaroj; de 9 ĝis 11jaroj; de 12 ĝis 14 jaroj) enkadre de publika ceremonio en Triesto.

Por kromaj detaloj/informoj:
noredv@tele2.it aŭ testudo.ts@gmail.com



Lernekskurso al muzeo

*Laŭ raporto de
Paulo S. Viana, kiu ankaŭ fotis*



La 15-an de aŭgusto 2008 grupo de esperantistoj el Lorena/SP, veturis al la ĉefurbo San-Paŭlo por viziti la Muzeon de la Portugala Lingvo. Aliĝis al la grupo kelkaj esperantistoj el la ĉefurbo mem, kaj ĉiuj kune dum kelkaj horoj trairis la tutan ekspozicion. La portempa ekspozicio omaĝis la centjaran forpason de la brazila verkisto Machado de Assis.

Tiam la grupo, nome de eldonejo Oportuno, kaptis la okazon transdoni al la prizorganto de la ekspozicio tri verkojn de Machado de Assis tradukitajn al Esperanto de Paulo Viana mem: *Postmortaj rememoroj de Brás Cubas*, *Dom Casmurro* kaj *La divenistino kaj aliaj rakontoj*.

Antaŭ ol viziti la ekspozicion, la grupo fotiĝis kun la esperanta flago kaj kaptis la okazon ankaŭ pliriĉigi sian vortprovizon per precizigo kaj difinado de vortoj iel komunaj al la beletra universo de la omaĝita aŭtoro.

Ĉiuj grupanoj kunportis hejmen broŝureton pri la omaĝato, krom lia esperantigita rakonto ‘Kiel oni inventis almanakojn’ — kiu taŭge ilustras la ironieman stilon de la aŭtoro. Antaŭ tagmanĝo en proksima agrabla restoracio, la grupeto vizitis la apudan, antikvan, belarkitekturan trajnostacion “Luz”, kaj ankaŭ tie la grupo fotiĝis kun la verda flago. La agrabla ekskurso estis iniciato de Lorena Esperanto-Klubo kadre de siaj tiel nomataj “Subĉielaj Lecionoj”.

Daŭrigota sekvapaĝe

Ĉu vi scias la diferencon?

Kiel kutime, la gvidanto de tiuj lernekskursoj, Paulo Sergio Viana, defiis la ekskursanojn per ĉi-suba difinludo.

Provu ankaŭ vi kiel eble plej ĝuste difini ĉiun apartan vorton sen konsulto al la respondoj.

ROMANO > NOVELO > RAKONTO > HISTORIO > FABELO > FABLO
IRONIO // SARKASMO > MOKO > ŜERCO > CINIKO

Respondoj

Romano: pli-malpli longa, ĝenerala fikcia verko kun sinsekvo da okazintaĵoj. **Novelo:** malpli longa ol romano, malpli abunda je okazaĵoj, malpli kompleksa. **Rakonto:** kelkpaĝa, fikcia aŭ reala sinsekvo de okazaĵoj. **Historio:** fikcia aŭ dokumenta priskribo de okazaĵoj, sendepende de longeco. **Fabelo:** fantazia rakonto, ofte el la tradicio de popoloj. **Fablo:** rakonto, en kiu la roluloj estas bestoj aŭ objektoj, kun morala instruo. **Ironio:** metafora esprimo, per kiu oni asertas la malon de tio, kion oni intencas diri.

Sarkasmo: kruda, foje agresa ironio. **Moko:** ago por ridindigi. **Ŝerco:** amuza diraĵo. **Ciniko:** filozofia sinteno de spitado pri la konvenciaj valorajoj en la socio.

Cecilia: mi volas loĝi endome – *Ulysses Baldez*



Dumonata enkonduka kurso aŭ unujara baza kurso?

Emerson Werneck

La unua maltrankviliĝo, kiu sekvas la entuziasmon eklerni pri Esperanto estas la dubo pri kia kurso plej taŭgus por daŭrigi la lernadon, sen tuj perdi la intereson. La plejmulto el la novaj lernantoj volas lerni la lingvon laŭeble plej rapide. Verŝajne pro tio kulpas la propagando kutime farata pri la ega facileco de la internacia lingvo.

Esperanto estas ja pli facila por lerni ol la plejparto de la naciaj lingvoj, sed ĝi ne nepre estas facila lingvo. Estas simpla iluzio, diri, ke oni povas babili flue post nura jaro da lernado. Memevidente, tio dependas de la sindediĉo de la gelernantoj mem, kaj de la kvanto de lecionoj, sed por la plejmulto de ili, pli ol du jaroj necesos por bone regi la lingvostrukturon kaj leksikon.

Kompreneble, tio ankaŭ dependas de la frekvenco de la lecionoj, kaj de la proksimeco inter unu leciono kaj la alia, krom la fakto, ke oni devas praktiki hejme tion, kion oni lernas en la klasĉambro. Ĝenerale la unujaraj kursoj sekvas la modelon “du klasoj semajne” kun unu horo ĉiu. Do, se la klasjaro daŭras ok monatojn, dividitajn en du kvarmonatojn, oni havos 64 horojn entute.

Sed dumonataj aranĝoj kutime estas organizataj kun kvin unu-horaj klasoj semajne, sumigante 40 horojn. Oni povas, do, konkludi, ke la unujara aranĝo estas preferinda, ĉar ĝi entenos 60% pli da enhavo! Ĉu tiu rezonado eble pravas?

La unujaraj kursoj havas la jenajn malavantaĝojn: La gelernantoj ne ĉiam sukcesas ĉeesti 100% el la klasoj, mistrafante averaĝe 20-30% el la lecionoj. Kaj la malproksimeco inter la lecionoj de unu semajno kaj alia damaĝas la fiksadon de la enhavo en la mensoj

de la lernantaro. Ekzemple, se la aranĝo estas lunda-merkreda, la lernanto atendas kvar tagojn ĝis la venonta semajno. Se li aŭ ŝi ne faras la hejmtaskon pro ia ajn kialo, lia aŭ ŝia memoro devos esti refreŝata en la sekva lundo, antaŭ ol li aŭ ŝi povos reiri antaŭen.

Pro tio, la intensivaj aranĝoj estas verdire pli elektindaj, ĉar la frekvenco de la klasoj favoras la memorigadon de la enhavo. Tiuj kondiĉoj permesas, ke oni havu malpli da revizioj dum la klasoj, kaj pliglatigas la lernadon de la strukturo kaj leksiko. Tial, eblas prezenti preskaŭ la saman enhavon en malpli da tempo.

Laŭ mia sperto, kiel eks-instruisto de la angla kaj de la portugala per la Berlitz-metodo, la intensivaj kursoj estas pli efikaj ol la unujaraj modeloj. La lernejo Berlitz havas la kopirajton de la sistemo "Total Immersion" (Plena Envolviĝo), laŭ kiu la gelernantoj ricevas semajnon da instruado, per rekta metodo, kun ĉirkaŭ 8 horoj tage. La rezulto de la preskaŭ 40 horoj da lernado estas flueco kaj sendependeco de la instruisto. Je la mezo mem de la kurso, la lernanto jam montras sin fluparola kaj kun granda kapablo inventi novajn frazojn sen la helpo de la instruisto. Kompreneble la leksiko estas la granda problemo, sed se la kurso estas gvidata tuj antaŭ vojaĝo al la lando en kiu la lingvo estas parolata, la lernanto rapide kreskigas sian vorttrezoron post kelkaj tagoj. Kompreneble, se li aŭ ŝi ne praktikas la enhavon tuj post la kurso, lia aŭ ŝia flueco kaj regado de la lingvo malaperos rapide. Sed koncerne Esperanton, ĉar la strukturo estas tute regula, la lernado daŭros pli longe, eĉ se la lernanto ne partoprenas kongreson aŭ renkontiĝon tuj poste.

Sekve, mi defendas la ideon, ke estas pli inda oferi pli da dumonataj kursoj, kun la sistemo po 5 horoj semajne, ol riski perdi la intereson de la gelernantoj dum la periodo de unu jaro, dum kiu ĉio povas okazi, kaj forpreni la atenton de la klasmembroj. Ju pli oftaj kaj proksimaj estas la lecionoj, des pli bona estos la rezulto. Verdire, se la kurso estas gvidata intensive dum du monatoj, ĝi fariĝos ne plu enkonduka, sed ja baza!



Aŭkcio



Lude kaj lerne

Bezوناتa materialo: kelkaj esperantaĵoj (revuo, paĝmarkilo, ŝlosilringo...) kaj kelkaj frenezaj objektoj (alumeto, tolaĵpinĉilo...)

Celo: praktikado de numeraloj

Aktivado: La aŭkcianto skribas surtabule la nomon de la unua aŭkciaĵo (aŭ iun nomon aludantan ĝin) kaj diras: “Jen la unua aŭkciaĵo. Mi proponas, ke ni komencu per kvin steloj... Kiu proponas pli?...”.

Por scii pri kiu objekto temas, la ludantoj devas ‘aĉeti’ ĝin. Restos kun la objekto tiu, kiu faros plej bonan proponon. Tiam la aŭkcianto tradukos/klarigos la vorton, montros la objekton kaj liveros ĝin al la aĉetinto. Poste, surtabule li skribas la nomon de nova aŭkciaĵo kaj daŭrigas la ludadon.

Rimarkoj:

- 1- Antaŭ ol ludigi la lernantojn, interkonsentu pri iu kredito-limo (ekz-e 100 steloj) por ĉiu, por ke ili povu aĉeti aŭkciaĵojn.
- 2- Notu surtabule aŭ surpapere kiom multe ĉiu aĉetinto jam uzis el siaj steloj;
- 3- Cele praktiki numeralojn, instigu la lernantojn proponi poiome (kvin post kvin steloj ekzemple) kaj foje eĉ per centonoj!;
- 4- Prezentu la aŭkciaĵojn tiamaniere, ke la ludantoj ne sciu, ĉu ili faras proponon por akiri ion konservindan aŭ ion forĵedindan. La surprizo (ĉu agrabla aŭ amuza) estas la spico de la ludo!;
- 5-En tiu ĉi varianto de aŭkci-ludo estas nek venkinto nek venkito, sed sole ŝparemaj kaj malŝparemaj stel-proponantoj! La ludo finiĝos, kiam finiĝos la aŭkciaĵoj.



Komentoj: *Paulo Sérgio Viana*

Ĉi-foje nia tradukdefio prezentas tekston kun regionecaj esprimoj kaj multe da problemoj en malmulte da linioj. Ekzistas du manieroj aliri tiaspecan tekston: oni klopodu laŭeble plej fidele redoni la signifon de lokaj terminoj en Esperanto (por konservi la koloron de la originalo), aŭ oni flankenlasas regionecajn detalojn, kiuj eventuale ne gravas por alikulturaj legantoj (favore al pli natura teksto en Esperanto). Ambaŭ solvoj estas pravigeblaj kaj oni devas respekti la elekton de la (kompatinda) tradukanto. La problemo estas, ke tro detala transigo de terminoj foje rezultigas nenaturan tradukon.

Sekvapaĝe mi notas iujn tiklajn esprimojn el la originalo.

Sendube la traduko numero 5 estas la plej bona: korekta, bonstila, vigla, fidela kaj natura – ĉiuj kvalitoj de sukcesa atingo. Mi nur ankoraŭ insistas: ĉu la verbo en la esprimo “viroj, kiujn neniu valoris” ne devus esti “valorigis”? Spite tiun detaleton, gratulon al la heroo tradukinto!

La tradukon n-ro 5 sendis **Francisco Stefano Wechsler**, el la urbo Campino/SP. Krom nuna estrarano de Brazila Esperanto-Ligo, Francisco Wechsler ankaŭ estas ĉefredaktanto de ties organo *Brazila Esperantisto*. Kiel libro-premio, kvar opcioj de titoloj estis proponataj al li, kiu dankis sed preferis, ke alia esperantisto ricevu la regalaĵon laŭ nia elekto mem.

Elektita tradukaĵo:

Nigra malĝojo premis la loĝantojn de la ĉefdomo. Dum tri tagnoktoj oni maldormis, haste manĝis, timegante la inundon. La muelejo kaj farunejo estis plenplenaj de forpelitoj. Tiuj ĉi estis la apudrivera loĝantaro, frakasita, kiu ĝismorte malsatus, sen la gado kaj sekfaruno el la bieno.

Oni konversaciis pri la epizodoj dum la inundo, eĉ trovante amuzaj la aventurojn de saviĝo. João de Umbelino laŭvole mensogis, rakontante fanfaraĵojn, kiujn neniu atestis. Ĉifonuloj, konsistantaj el flavhaŭtaj kaj ploremaj infanoj, virinoj kun velkaj mamoj kaj viroj, kiujn neniu valoris – sed homoj je kiuj oni nepre povus kalkuli por plej peniga laboro kaj plej hundeca lojalo.

Ni tiam eliris por konstati de proksime, kion faris la rivero. Sur la muro de la ĉevalejo kaj sur la ŝtipbarilo vidiĝis la akvomarko. La aperturo de la rafinforno ŝajnis akvuĝejo. Unu plia manlongo da akvonivelo estus detruinta la rafinejon. La bovorto fariĝis kotmarĉo, kiun la bovoj hufmarkadis. Ĉie flareblis malagrabra kotodoro.

REGO, José Lins do – *Menino de Engenho*, 23-a eld., Eldonejo José Olympio, Rio de Janeiro, 1977 - p 31

Originala elpreno:

- 1** ← Havia uma sombria tristeza **na gente**
da casa-grande. Há três dias que ali não se
dormia, comia-se às pressas, com o pavor da
inundação.
- 2** ← O **engenho** e a **casa de farinha** repletos
de flagelados. Era a população das margens do
rio, arrasada, morta de fome, se não fossem
o **bacalhau** e a farinha seca da fazenda.
4 ← Conversaram sobre os incidentes da enchente,
achando graça até nas peripécias de salvamento.
João de Umbelino mentia à vontade, contando
pabulagens que ninguém assistira. **Gente**
5 ← **esfarrapada,** com meninos amarelos e chorões,
com mulheres de peitos murchos e **homens que**
ninguém dava nada por eles – mas uma gente com
quem se podia contar na certa para o trabalho
mais duro e a **dedicação mais canina.** → **6**
- **7**
Saímos então para ver de perto o que o rio
tinha feito. Na parede da estrebaria e nos paus
do cercado ficara a **marca das águas.** → **8**
A boca da fornalha parecia um açude. Com mais de um
→ **10**
9 ← **palmo** a casa de purgar teria ido embora. O
cercado era um **atoleiro** por onde os bois iam
→ **11**
deixando as marcas dos cascos. Por toda a parte
um cheiro **aborrecido** de lama.
- 12** ←

REGO, José Lins do – *Menino de Engenho*, 23-a
eld., Eldonejo José Olympio, Rio de Janeiro,
1977 - p 31

Komentoj:

1. Al mi ne plaĉas la vorto “gento” tiusence. “Mastrodomo”, “ĉefdomo”, “farmodomio”, “biensidejo” estas akcepteblaj solvoj, sed mi preferus “sinjordomo”, kiel proponis unu el la tradukintoj.
2. Mi preferas “sukerfabriko”, anstataŭ “sukerejo”. “Muelejo” ŝajnas al mi tro malpreciza. Ĉu eventuale “sukermuelejo”?
3. Post kiam la leganto jam eksciis, ke temas pri fabriko, tiam simple “farunejo” sufiĉas. Se oni deziras precizecon, do “farunfabriko”.
4. Alternativoj por “gado” kaj “moruo” estus simple “sekfiŝo” aŭ “peklita fiŝo”, kiu transdonas la ideon, ke temas pri fiŝo provize konservata.
5. Ne temas pri “ĉifitaj uloj” aŭ “gento”, sed pri “ĉifonuloj” aŭ “ĉifonularo”.
6. La intence misorda frazkonstruo en la originalo kaŭzis problemon! Al mi plene plaĉis neniu el la proponitaj solvoj. Unu kandidato tradukis: “viroj, kiujn neniu valoris”. Laŭ mi, li devus elekti “valorigis”. Alia uzis “valorigadis”, kaj ankoraŭ alia, “konsideris”. Mia alternativo: “viroj senvaloraj antaŭ ĉies okuloj”.
7. “hundeca lojalo”, “hunda fideleco”, “hundeca sindediĉo” estas akcepteblaj alternativoj. Sed oni nepre ne forigu tiun fortan esprimon!
8. Mi preferus “spuro” aŭ “signo”, anstataŭ “marko”.
9. Anstataŭ spano (tro teknika!) aŭ “manlongo” aŭ “manplato”, mi preferus “manlarĝo”, same kiel nur unu el la tradukintoj.
10. Temas pri loko, kie oni purigas la materialon. Do, ŝajne “rafejo” bone taŭgas, sed “purigejo” estus alternativo. Unu tradukinto uzis la strangan esprimon “purigeja domo”!
11. Ĉu “kotejo” ne estas pli fidela kaj simpla ol “marĉo”, “enkotigejo”, “marĉejo”? Du tradukintoj pensas kiel mi.
12. Kompreneble ne temas pri “teda”, “enuiga” aŭ “enuigita” odoro! “Naŭzega” ŝajnas al mi troa. “Malagrabla” aŭ “ĝena” sufiĉas, ĉu?

Traduku la ĉi-suban elprenaĵon el la verko "Olhai os Lírios no Campo" de Erico Veríssimo, kaj sendu vian tekston rete aŭ poŝte plej malfrue ĝis la 30-a de aŭgusto 2008.

Atravessou o pátio interno da fábrica. Os grandes pavilhões de concreto pareciam estremecer ao ritmo das máquinas. Eugênio ouviu aquela pulsação surda que lhe sugeria o bater dum enorme coração subterrâneo. Ela lhe dava uma vaga angústia, causava-lhe um indefinível temor: dir-se-ia a aflição dum homem que sente no subsolo o agitar-se duma sub-humanidade que trabalha com silenciosos propósitos de destruição. O atroar das máquinas era um ruído ameaçador.

O escritório lhe pareceu mais frio e convencional que nos outros dias. Sentou-se à mesa, abriu uma das gavetas, remexeu nos papéis... Não encontrando os que procurava, chamou a secretária, uma rapariga magra de ar cansado

— Boa tarde, D. Ilsa. Alguém me procurou?

— Não senhor, ninguém.

— Onde estão aquelas folhas que vão para o Ministério do Trabalho?

— Na gaveta do centro.

Tornou a abrir a gaveta e encontrou os papéis.

— Tem razão, cá estão eles.

Pô-los em cima da mesa, tomou da caneta.

— A senhora anda muito pálida e com jeito de cansada. Por que não tira umas férias?

Assinava os papéis automaticamente, sem revisá-los. Sentia agora um interesse fraternal pela secretária. A criatura tinha um jeito encolhido de passarito doente.

— E a dor nas costas... ainda não passou?

— Às vezes, quando me deito, ela vem.

— Deve ser da posição em que fica quando escreve à máquina.

Precisa cuidar-se D. Ilsa.

A moça sorria, meio constrangida.

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo

Unua klerigejo en la mondo, kiu proponas ĉiutagan instruadon en Esperanto

Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, Centro de Konstanta Edukado, estas nepublika klerigejo funkcia ekde 1991, lauleĝe registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz (n-ro 232/94) kaj laste ĉe la Urbestro de Bydgoszcz (n-ro 13/08) kiel Centro de Konstanta Edukado. En 1996 la studumo akiris la statuson de Klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino. En la studumo instruadas lekciistoj de AIS kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB), Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en Hago, Universitato de Kazimiro la Granda kaj Muzeo de Diplomatio en Bydgoszcz (UKW), Ekonomia Altlernejo en Bydgoszcz, Kujavia-Pomerelia Centro por Edukado de Instruistoj, Vojevodio Kulturcentro en Bydgoszcz, krom tio ĵurnalistoj kaj spertuloj de Pola Turisma-Landkona Societo, Societo de Amikoj de la Urbo Bydgoszcz, Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo „Kujavio kaj Pomerelio”, Pola Esperanto-Asocio kaj Oficejo de Vojaĝantoj „Flugo”.

En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon aŭ maturekzamenon kaj bonan san-staton. Eduk-ciklo dum tri jaroj permesas akiri sciojn necesajn por labori en naŭ profesioj (simboloj de Eŭropa Unio):

post la 1-a studjaro — akireblaj kvalifikoj: lektoro de Esperanto por komencantoj kaj gvidanto de porinfanaj aranĝoj; profesioj/postenoj: oficisto pri turisma informado (422104), oficisto en vojaĝagentejo (422103) kaj internacia vojaĝgvidanto (511301);

post la 2-a studjaro — kvalifikoj: lektoro de mez-nivelaj kursoj de Esperanto kaj verkanto de arta ceramiko; profesioj/postenoj:

organizanto de turisma priservado (341401), regiona turisma ĉiĉerono (511304) kaj animanto de kultura agado (347601);

post la 3-a studjaro - profesioj/postenoj: instruanto de Esperanto (235910), specialisto pri organizado kaj disvolvo de turismo (241915) kaj specialisto pri organizado de kulturo (241990); ev. titolo de bakalaŭro de AIS pri humanistiko aŭ morfosciencoj, se oni havos maturekzamenon kaj sukcesos AIS-ekzamenojn.

Laŭ dekreto de la pola Ministro pri Edukado de la 1-a de aŭgusto 2000, kiu estis publikigita en la ŝtata leĝ-ĵurnalo — fin-diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝgvidantojn labori per Esperanto.

En la jaro 2008/2009 kadre de la Studumo oni planas kunlabore kun Universitato de Kazimiro la Granda kaj Ekonomia Altlernejo en Bydgoszcz, krome Oficejo de Vojaĝantoj „Flugo” gvidadon de specialigitaj kursoj pri turismo, kulturo kaj komerco kaj ankaŭ konversaciaj lingvokursoj. Eblas ankaŭ partopreni semajnajn kursojn kun studentoj de ISTK/AKB.

Kunlaboro kun AIS San Marino kaj sciencaj institucioj en Pollando permesas akiri sciojn pri diversaj branĉoj de scienco kaj kulturo — i.a. pri ekologio, eŭrologio, etnologio, etnografio, ceramiko, kultur- kaj soci-geografio, interlingvistiko, historio, politikaj sciencoj, diplomatio, komerco, merkatico, estrado, teatro-danco kaj de pluraj lingvoj.

La studjaro 2008/2009, kiu komenciĝis la pasintan septembron kaj daŭros ĝis majo 2009, ampleksos — laŭ ĉiutaga sistemo po 30-40 studhoroj semajne (ferioj decembre kaj januare), kaj laŭ t.n. eksterĉeesta sistemo — la tri stud-ekzamenajn AKB -Sesiojn: 33 Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kun 31 AKB — Sesio dum 20-28.09.2008, Internacia Pedagogia Kurso dum 31.01-8.02.2009 kaj 32 AKB-Sesio kadre de 34 Esperanto-Tagoj

de Bydgoszcz dum 18-26.04.2009. Necesas partopreni almenaŭ finekzamenan 32 AKB-Sesion dum 18-26.04.2009. Eksterĉeestaj gestudentoj povas ankaŭ partopreni, sen krompago, libere elekteblajn kursojn ekster la sesioj.

Dum la jaroj 1991–2008 lecionojn en la Studumo gvidis lekciistoj el 60 landoj de Eŭropo, Afriko, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio por gestudentoj el 90 landoj de la mondo. La plej ofte uzataj lingvoj en la Studumo, apud la pola kaj Esperanto, estis: angla, hispana, franca, litova, ĉina, albana, itala, mongola, germana, rusa, portugala kaj svahila. La gestudentoj konatiĝis tiel pri kulturo kaj lingvoj de diversaj nacioj, kaj fremdlandanoj ankaŭ pri la pola. Okazis ankaŭ Internacia Festivalo de 36 lingvoj.

En Bydgoszcz la studjaro 2008/2009 komenciĝis per 33 Internacia Forumo pri Turismo, Edukado kaj Kulturo kun 31 Sesio de AIS Klerigejo Bydgoszcz (AKB) dum 20-28 de septembro 2009, okaze de Monda Tago de Turismo (27.09) kaj Europa Tago de Lingvoj (26.09).

Gestudentoj de la studumo povas ankaŭ studentigi ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj, kio rajtigas al 75% rabato de kromaj kurset- kaj ekzamen-kotizoj de AIS en Bydgoszcz aŭ aliloke en centra/orienta Eŭropo — kaj al ĉiuj fin-studentoj permesas akiri la titolon de bakalaŭro, kaj, post pliaj du studjaroj, ankaŭ magistro de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) pri humanistiko aŭ morfosciencoj.

Eblas ankaŭ aliĝi por Kursoj de Pola Lingvo en Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz(UKW) dum 1.10.2008 — 31.01.2009, 1.02 — 30.06.2009 kaj dum 1.07 — 30.09.2009 por Internacia Universitato de Kulturo kaj Pola Lingvo. La kursoj ebligas lerni la polan lingvon tiugrade, ke oni povos aliĝi post ekzamenoj ankaŭ al studado ĉe Universitato de Kazimiro la Granda en Bydgoszcz ĉu por studi geografion kaj turismon, ĉu aliajn fakojn

en la Universitato. Tiamaniere, studante en Bydgoszcz eblos samtempe akiri kvar diplomojn: de ISTK, bakalaŭran kaj magistran de AIS kaj magistran de la Universitato (UKW). Eblas krompagi la ISTK-studadon 2008/2009, kaj ankaŭ aliĝi por Kursoj pri turismo en Ekonomia Altlernejo en Bydgoszcz dum 1.10.2008-31.03.2009 aŭ dum 1.04-30.09.2009. Tiuj kursoj ebligos preparon por studado en Ekonomia Altlernejo en Bydgoszcz.

Dum 2006/2007 en ISTK en Bydgoszcz studis 132 gestudentoj el pli ol 20 landoj kaj 4 kontinentoj kaj pli ol 70 gestudentoj dum 2007/2008 de la tuta mondo. Ĝis nun aliĝis jam por 2008/2009 pli ol 120 kandidatoj el 4 kontinentoj.

Aliĝo por ISTK — studado 2008/2009 kaj por Internacia Universitato de Kulturo kaj Pola Lingvo (1.07 — 30.09.2009) ebligos ankaŭ partoprenon en la 18-a Internacia Esperanto-Kongreso en Bydgoszcz (18-25.07.2009) kaj 94 UK — Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, Pollando, (25.07-1.08.2009). Venu ankaŭ vi kaj viaj geamikoj!

Bonvenon al nia Internacia Studumo kaj AIS-Klerigejo Bydgoszcz(AKB), kiu estas la unua en la mondo, kie oni ĉiutage instruas en Esperanto!

Sekretario de la Program-Konsilio

mag. Wojciech Ruminski

Prezidanto de la Program-Konsilio

ASci.mag. Andrzej Grzebowski

Por informoj pri stud- kaj loĝad-kotizoj, bonvolu turni vin rete al andreo@rubikon.net.pl aŭ poŝte al **Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo**, str. M.Sklodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando.



En 2007 Bruno kaj lia
labradora hundo Breno
konatiĝis kun la
esperanta movado...



En aŭgusto 2008 ilia
rakonto estis premiita en
la Belartaj Konkursoj de
UEA kiel la *Infanlibro de
la Jaro...*



Dume en la korto de Breno
aperis forlasita hundineto
kun dolĉa rigardo...

Nu, ĝuu mem la novan
aventuron de Breno kaj
Lilika!





www.ileibr.org/butiko